



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 289

Dépôt à la Bibliothèque Nationale, au Fonds Normand de la Médiathèque de Caen, aux Archives du Calvados et à la Bibliothèque de Cherbourg.

Oktobro 2024

Enpaĝigas : Michèle Langeois

Korektas Dominik Cornice

Hérouville-Espéranto, Maison des Associations
10-18 Grand Parc 14200 Hérouville-Saint-Clair
esperanto.herouville.14200@gmail.com



1984-2024

HÉROUVILLE - ESPÉRANTO



Karaj samideanoj.

Ĝi ne estos la lasta, ni esperas! Ni ĝojas dissendi al vi tiun ĉi normandan bultenon malgraŭ la malfondiĝo de nia normanda asocio. Ĉiuj klopodis revigligi ĝin post la kronvirsusa epidemio, sed... forpasis nia karmemora Ivo, ĝia sindonema ĉefaganto kaj poste translokiĝis al alia regiono Veronik, nia prezidantino.

Neniu proponis sin por repreni la torĉon.

En marto, eksterordinara kunveno rezignaciis pri **malfondo de la normanda asocio**.

Siaflanke, **la havra klubo**, kiu ludis gravan rolon en la historio de Esperanto en Normandio, ankaŭ decidis malfondiĝi pro manko de aktivaj membroj.

Ambaŭ asocioj decidis heredigi siajn havaĵojn al Hérouville-Espéranto. Tio ebligis, ke tiu ĉi bulteno ankoraŭ estu eldonita.

Sed ne nur tion ni heredis. Estante nun la sola esperantista asocio en Normandio, Hérouville-Espéranto baraktos kunigi esperantistojn el la tuta regiono por ke la esperanta normanda movado plu.

Estas ja granda defio, kiu estis tiel transdonita al ni.

Ĉi-jare, ni festas **la 40-an datrevenon** de la fondo de nia klubo.

Vi jam estis invititaj partopreni okaze de la prelego de Renée Triolle kaj de la staĝo, kiujn ni aranĝis en marto.

Ankoraŭ kelkaj eventoj okazos de septembro ĝis novembro, en kiuj ni kun granda ĝojo esperas bonvenigi vin.

- **La 8-an de septembro**, ni aktive* partoprenos en la granda Festo de la Asocioj en Hérouville.

- **De la 11-a ĝis la 13-a de oktobro** ni renkontiĝos kun la esperanto-klubo en Troyes... kaj gustumos... la lokan limonadon.



P. 2

ENHAVO

- P. 1 Frontartikolo de la prezidanto, enhavo
- P. 2 La Normanda Asocio, La ŝtona urbo
- P. 3 Unuaj kontaktoj kun Esperanto por 200 junaj mezlerneĵanoj
- P. 4 et 5 La strasburga Kongreso
- P. 5 Kuraci la dolorojn
- P. 6 Forpaso: Petro Quillaud kaj Henri Rousseau
- P. 7 Havro kaj esperanto: longa historio
- P. 8 et 9 La Olimpika flamo kaj Zef (traduko de la artikolo de la gazeto)
- P. 10 et 11 La 40-a datreveno de nia klubo
- P. 12 Plantado de la arbo esperanto, koncerto de Armel Amiot la 8-an de novembro



- **La 8-an de novembro**, kun la helpo de la komunumo Hérouville Saint-Clair, ni plantos **ginkon**, simbolo de paco, en la skvaron Esperanto, okaze de la deka datreveno de ĝia inaŭguro.

Poste okazos nova **koncerto** de nia esperantista amiko Armel Amiot, kiu kantos kelkajn el siaj esperantistaj kanzonoj sed ankaŭ kelkajn de Graeme Allwright en la franca.

Tiuj aranĝoj estos sufiĉe gravaj kaj ni esperas, ke multaj esperantistoj el Normandio partoprenos, por ke nia agado kaj niaj ideoj estu dise eĥitaj.

Gravas tiu bulteno kiu ligas normandajn

esperantistojn sed ankaŭ estas legata eĉ eksterlande. Ni klopodos daŭre eldoni ĝin samaŭ alimaniere.

Karaj samideanoj, ne restu solaj, membriĝu en la klubo Hérouville-Espéranto, daŭre verku kaj sendu artikolojn por ke ni ankoraŭ povu eldoni tian bultenon, proponu rimedojn por ke vivu la normanda esperantista movado spite al la malfacilaĵoj.

Bertrand Verstraete, prezidanto de la klubo Hérouville-Espéranto.

*B.N: Malfeliĉe pro la malbona vetero la festo estis nuligita!




Vizito al la klubo de Troyes

La somero finiĝas kaj nun la aktivecoj de nia klubo rekomenciĝas, kiel planite nia vizito al la klubo de Troyes estas en ordo kaj okazos la 12an kaj 13an de Oktobro.

La klubo de Troyes atendas nin kun granda plezuro kaj ĝi estos la okazo renkonti Francajn Esperantistojn kaj dividi niajn spertojn, en la momento kiam mi skribas tiun tekston la programo ankoraŭ ne estas definitiva sed sendube, certe tre interesa por ĉiuj, ni pasigos la sabaton en Troyes kun klubanoj de Troyes kaj laŭ la tradicio en Ĉampanjo ni ne povas fini la tagon sen gustumi ĉampanon, do ni transiros al la kooperativo de Chassenay d'Arce por viziti la vinkelon kaj ĝian malgrandan muzeon kaj kompreneble havi ĉampan-gustumadon. Ni rakontos al vi la daŭrigon en la venonta numero.

Christian Danel 14)

Anna Löwenstein



Anna Löwenstein LA ŜTONA URBO

Edonejo Flandra Esperanta Ligo 1999. 338 paĝoj

Anna Löwenstein interesiĝis pri la romianoj kiam ŝi unuafoje vizitis Italion, en 1982. La tiom grandiozaj monumentoj tiel imponis ŝin, ke venis al ŝi stranga demando: se « barbaro » veninta el malproksima malpli evoluinta socio vidus tiujn konstruaĵojn, kian impreson li havus? Tiel naskiĝis la ideo por skribi la unuan romanon de Anna Löwenstein pri la romia epoko, La ŝtona urbo. Fininte la legadon de Memoraĵoj de Julia Agripina, la tria romano de la serio pri la romianoj, venis al mi la deziro relegi la du unuajn, La ŝtona urbo kaj Morto de Artisto, kiujn mi estis legintaj antaŭ multaj jaroj. Kun granda plezuro kaj konstanta intereso, mi relegis la unuan romanon.

Temas pri Bivana, juna keltino kiu vivas en malgranda vilaĝo, en suda Britujo, en la unua jarcento de nia epoko. Kun siaj familianoj kaj samaĝaj knabinoj ŝi travivas kvietajn tagojn kaj sezonojn. Tamen en sufiĉe malproksimaj regionoj, la romiaj armeoj ofte prirabas la lokajn loĝantarojn, bruligante la kabanojn, ŝtelante la rikoltojn kaj la brutarojn, ŝafarojn, kaprarojn ...

Plie la soldatoj elektas inter la postvivantoj ĉiujn gejunulojn kiel sklavojn. Tiu malfeliĉo trafis la junan Bivanan post la malvenko de sia popolo kaj detruo de la tiea domaro. Tiam ŝi estas portita al Romo kiel sklavino, samkiel aliaj pli malpli samaĝaj gejunuloj. La ŝtona urbo esploras la penan lukton de Bivana por adaptiĝi al la vivo en pli « progresinta » socio, kvankam, kiel oni malkovris en la komenco de la romano, la kelta civilizacio ne estis tiel primitiva, kiel oni emas supozi. En Romo, ŝi ekkonis la fruajn kristanojn, kiuj estis ne sanktuloj sed aktivuloj en nova movado ofte dividita pro kvereloj kaj polemikoj.

Al tiuj kiuj ŝatus lerni pri nekonataj kutimoj de la keltaj druidaj popoloj kaj pri la ĉiutaga vivo en romia vilao, tiu romano de Anna Löwenstein estas tre rekomendinda

Gérard Sénécal (14)

Premiers contacts avec l'Espéranto pour 200 jeunes Collégiens

Unuaj kontaktoj kun Esperanto por 200 junaj mezlernejoj

La 7an de majo 2024, la liceo-gimnazio « La Providence » (1600 gelernantoj) de Le Mesnil-Esnard apud Rouen organizis por la klasoj de la gimnazio (5e, 4e, 3e) tagon pri « Mondcivitanoj ».

Estis multaj eltrovaj atelieroj dum la tuta tago: signolingvo, Rumanio, Martinika muziko, Hispanio, ... kaj Esperanto. Céline LECESNE Historia-Geografia mezgrada instruistino prezentis en sia klasĉambro atelieron por 7 diversaj klasoj dum 45 minutoj ĉiufaje, de la 8h30 ĝis la 17h00. Inter 190, 200 gejunuloj havis unuan kontakton kun E°.

Notinde: Neniu el ili antaŭe aŭdis pri nia lingvo.

La 23an de aprilo, en la hejmo de **Céline kaj Mattieu LECESNE** ni kunvenis kun **Sébastien EHRARD** (Henri de Sabatès) iama prezidanto de E°-Normandie. Ni tiam elektis la prezentotan materialon: lumbildan (22 diapozitivoj PowerPoint) muntaĵon pri la lingvistika aspekto de E°, pere de videoprojekciado + 7 aliaj por dank'al etaj simplaj frazoj paroligi la grupojn. Do, post klarigoj, post mia elparolado de ĉiu frazo, ili ĥore legis ilin kaj petis eventualajn kromajn klarigojn. Ekde la enkonduka parolado, ni disdonis al ĉiu lernanto kaj instruisto, 2 paĝojn kun la klarigoj pri la prononcado kaj akcentado de E°, la leksikon de la frazoj kun traduko, kaj alian paĝon kun argumentaro por eklerni nian lingvon. (La materialo estis presita de la Gimnazio). Estis menciitaj ligiloj por la internet-paĝoj de «Duolingo, Lernu.net, I-kurso, Metodo Assimil de Sébastien Erhard, Wikipedio en E°, E°-France, Sat-Amikaro ».

Ĉiu partoprenanto ricevis, fine de nia interveno, la etan kalendaron (2024), eldonita de E°-France. Céline montris al ili esperantlingvan Wikipedian paĝon pri Le Mesnil-Esnard, kaj aŭdigis kanton de «Kajto» en E°.

La antaŭan tagon de nia interveno, vespere, Céline helpis min muntadi 6 ekspoziciajn panelojn sur tabloj de sia klasĉambro, por prezenti la lingvistikajn karakterojn de la lingvo, siajn praktikajn atingojn: UNESCO rezolucioj kaj eldonoj, poŝtmarkoj, Pasporta Servo, Assimil eldonaĵojdank'al 65 folioj A4, kun multaj fotoj kaj grafikoj. Sur deko da tabloj, laŭlonge de tri muroj ni disponis 130 librojn, broŝurojn, BD, DVD, kaj dekon da E° gazetoj, por ke ili povu folumi ilin.

Vespere, mi estis intervjuita de tri junaj ĵurnalistoj de la kolegio, kiuj aperigos artikolon en la gimnazia gazeto. La tuta tago disvolviĝis en vera simpatia etoso. Laŭ la direktorino de la Institucio, la kolegiestrino, kaj diversaj geinstruistoj kiuj partoprenis tiun tagon, la laŭdiroj estis tre pozitivaj.

Fine, la gelernantoj bedaŭras ke oni ne lernigas al ili, eĉ ek de la elementa lernejo aŭ de la kolegio, tian trafan interpopolan lingvon. Ili ŝvitas kaj ĉagrenas lerni kaj balbuti malfacilajn lingvojn kiujn ili frekventas en tiu kolegio-liceo: Angla, Germana, Hispana, Rusa, Malnova Greka, Latina...Franca

Sekvinda afero ! ...



Pierre Lemarchand (Rouen)

Eŭropa Esperanto Kongreso okazis en Strasburgo inter la 8-a kaj la 12-a de majo 2024. La ĉefa temo, estis PACO (nuna aktualajo ĉu?) Ok samideanoj de nia klubo de Hérouville partoprenis kun 570 aliaj ĉeestintoj (213 francoj) kaj Duncan Charters prezidanto de UEA.

Kun plezurego mi denove restadis en tia belega Alzaco, vizitante la urbon, la faman katedralon, kaj tiajn pitoreskajn kvartalojn kiel «Petite France». Ni multe ŝatis ŝipveturadon laŭ la riveroj aŭ la kanaloj kaj diversajn koncertojn, konferencojn, kursojn...

Oni tiele povis mergi sin en esperantujon. Ni ankaŭ frandeme gustumis "kuglofojn" (kronkukojn) aŭ alzacajn vinojn.



Marie-Anne kaj Klod

La Strasburga kongreso

Eŭropa Esperanto Kongreso okazis en Strasburgo la dekan de majo 2024, kelkaj esperantistoj, kiuj partoprenis en la eŭropa kongreso en Strasburgo, kune kantis la esperantan himnon sur la ponto Kehl (la limbordo inter Francio kaj Germanio). Multaj havis unu piedon en Francio kaj la alian en Germanio. Estis simbolo por paco, unio kaj... Espero. Estis tre ĝoja momento!

Vero

"En majo 2024, mi partoprenis en franca-germana kongreso de Esperanto en Strasburgo. Estus pli multe por rakonti ol nia normanda bulteno povus enhavi! Mi do raportas nur pri du-tri okazaĵoj, kiujn mi trovis gravaj aŭ interesaj.

Ĉefe, mi bonŝancis renkonti aliajn samideanojn, kaj ĝojis revidi kelkajn amikojn, kiuj bonvenigis nin okaze de niaj pasintaj biciklaj vagadoj. Kun granda ĝojo mi ankaŭ renkontiĝis kun aliaj BEMI-anoj dum la bela ekskurso per biciklo tra la urbo Strasburgo. Tre plaĉis al mi la koncerto de Gijom' Armid', kies tekstoj estas tre belaj kaj multe interesis min. Li havis la bonan ideon projekcii ilin dum la kantado; tiel eblis bone kompreni ilin.

Ankaŭ interesis min la malkovra kurso por komencantoj fare de Fabien Tschudy. Estas tre taŭga kurso por varbi novajn esperantistojn. Eble ni povus inspiriĝi de ĝi. Dum la tuta kongreso, mi ne povis malebligi al mi pensi, ke antaŭ 80 jaroj inter Francio kaj Germanio, regis milito. Niaj popoloj hodiaŭ estas amikoj.

Revenu la paco tra la mondo! Estu Esperanto ĉiama lingvo por paco!



Ni iris al la Strasburga Kongreso de Majo 2024. Tio estis nia unua kongreso kaj ni devas diri ke ni estis iom maltrankvilaj ĉar nia Esperanta nivelo ne estas tre bona, ni ne parolas flue.... Sed ni estas komencantoj kaj decidis "sin ĵeti en la akvon" ».

Ni partoprenis en la kursoj de Fabien Tschudy kiuj estis por komencantoj kaj ni rimarkis ke nia nivelo ne estis tiel malbona. Ni havis mallongan anekdoton, dum la kurso estis germana homo kiu havis kelkajn problemojn por kompreni la klarigon de la instruisto sed mi volis helpi lin sed ĉar mi ne parolas la germanan mi estis devigita paroli esperante, ne estis tre facile sed finfine ni povis pli malpli bone interŝanĝi kune.

Konkludo: finfine tio estis tre bona kaj bela sperto kaj la etoso estis tre varma kaj kompreneble ĉiuj esperantistoj estis tre afablaj. Esperanto ja estas la internacia lingvo kiun ĉiuj homoj devus lerni.

Kristiano kaj Joëlle.

Post la kongreso, mi vizitis la ĵurasan urbon Château-Chalon, kie loĝis la fama franca verkisto Bernard Clavel, kiun mi tre ŝatas. Kun la helpo de Dominik' kaj Peter mi tradukis La Kantantan arbon kaj kelkajn aliajn rakontojn por infanoj, kiujn verkis tiu pacaktivulo.

Bertrand V.



Mi partoprenis la Eŭropan Esperanto-Kongreson en Strasburgo kiu okazis de la 8-a ĝis la 12-a de Majo 2024. La akcepto estis bone organizita, ĉiu homo havis insignon kun numero, sia nomo, sia lando. Mi partoprenis diversajn aktivecojn, inter kiuj: kurso, kanto, vizito, ludo. Mi revidis plurajn konatojn kaj mi babiladis kun ili. Sunis dum la tuta restado. Mi malkovris per tramo belan kvartalon de Strasburgo, kie mi vidis la katedralon.

Brigitte

Mia unua kongreso

La eŭropa kongreso de Strasburgo estis mia unua kongreso. Mi tute malkovris tiun sistemon kaj ĝian funkcion.

Tiu malkovro komencis ekde mia alveno la unuan tagon. Kiam mi eniris la universitatan konstruaĵon, min surprizis la homalfluo, la aktiveco kaj la etoso. La organizistoj havis multe por fari. Tiun mi ankaŭ retrovis dum la solena malfermo. Kongreso havas « ritojn » : solenaj paroladoj, simboloj, kantoj, ktp.

Mi renkontis multe da fremdaj personoj, kiuj ĉiuj inklinas al paroli kaj interŝanĝi. Mi konstatis ke oni povas paroli pri tre diversaj aferoj dum la prelegoj, sed ankaŭ ekstere. Mi aŭdis akĉentojn, mi petis bieron kaj kafon esperante, mi helpis partoprenantojn trovi iliajn vojojn, mi piknikis kun esperantistoj, mi aŭdis muzikojn, ktp.

Tiu kongreso pruvis al mi, ke esperanto estas tute spontanea kaj agrabla lingvo, sed ankaŭ ke la esperantista movado povas esti tre ĝojema projekto.

Simon



ALIA AFERO!

Kuraci la dolorojn

Multaj el vi scias, ke ĉiujare, mi veturas al Dax por kuraci miajn artrozajn dolorojn.

La kuracado, precipe, konsistas el varma koto sur kiu oni devas kuŝiĝi.

Sed, ĉu vi scias kial oni uzas varman koton? (Se jes, turnu la paĝon!) Mi klarigas por la aliaj.

Dum romiaj tempoj, garnizonoj staris en Dax. Unu el la legianoj posedis hundon kiun li amegis. Ve! tiu besto suferis artrozajn dolorojn kaj ne plu povis paŝi.

Kiel kutime, militistoj devas militi kaj forlasi la urbon. Forlasi la povran beston restis la sola, malĝoja ebleco por la soldato.

Post pluraj monatoj, la militistoj revenis surloken. Grandega surprizo! La hundo saltis, saltetis ĉirkaŭ sia amiko.

Kio okazis? Atestantoj deklaris, ke ĉiutage, longtempe, la hundo sinbanis en la varma koto de la rivero Adour.

Pro tio, varmaj termoj estis konstruitaj en Dax . (Oni povas viziti la romiajn restaĵojn.)

Nun, vi bone komprenas kial mi saltas, saltetas kiel hundo, kiam mi revenas el Dax!



Gigi Sénécal (14)

Notre ami Pierre QUILLAUD - Petro KIJO (2 avril 1928 – 23 avril 2024) s'en est allé.

Outre ses engagements dans de nombreuses associations, pacifiste et non-violent, syndicaliste, mutualiste, militant de l'association des « Papillons Blancs » (qui accompagne enfants et adultes en situation de handicap) aux côtés de son épouse Marie-Thérèse, Petro

KIJO fut la cheville ouvrière du mouvement Espéranto de l'agglomération rouennaise dès la fin des années 1950.

Il serait trop long de détailler tous ses engagements au sein des diverses associations internationales, telle que SAT, comme Trésorier pour ses membres du monde entier. (SAT-Peranto), en France et en région,

- Pour SAT-Amikaro, il fut l'organisateur de son congrès annuel à Rouen (1963), il aida Pierre et Claudine POTTIER pour celui d'Yvetot (1971) et Yves NICOLAS pour celui d'Hérouville-Saint-Clair (1993).

- Pour l'Union Française pour l'Espéranto – Espéranto-France, il siégea comme membre du Conseil d'Administration pendant des dizaines d'années au sein de sa Fédération Normande.

- Pour l'Union des Espérantistes de Normandie, puis d'Espéranto Normandie, il remplit les fonctions de président, puis de secrétaire, de trésorier, de rédacteur du bulletin associatif, auteur d'articles de presse, et organisa de nombreux congrès régionaux.

- Pour les groupes locaux de Rouen, Sotteville-lès-Rouen, Grand Quevilly : il fut responsable de groupe, professeur pour les cours du soir et les stages intensifs de fin de semaine, intervenant dans les groupes des « Auberges de Jeunesse » et des « Amis de la Nature »....

La cérémonie d'incinération a eu lieu le 3 mai dernier à Montpellier. Depuis le 6 juin 2024, ses cendres reposent à côté de son deuxième fils Jean-Christophe, au columbarium de Grand Quevilly (76).

Une perte immense pour notre association. Nos pensées sont tournées vers Marie-Thérèse, ses enfant et petits enfants.

Maryse et Pierre (Petro) Lemarchand (76)



En Avril 2024, notre ami Henri ROUSSEAU est décédé à l'âge de 96 ans.

Membre du club Hérouville-Espéranto depuis sa création, il avait auparavant en 1976 présidé l' Association Caennaise pour l' Espéranto. À ce titre il avait sollicité la nomination d' une rue Zamenhof auprès du Maire J.M Girault (malheureusement sans suite). Après le Maroc où il enseigne l' espéranto, il est nommé en 1958 en tant qu' ingénieur à Madagascar où il aida au renforcement de l' Espéranto et à son

implantation.

En 2012 il écrit une brochure " Rememoroj pri esperanto en Madagaskaro 1958-1963"

En 2014 il fait une conférence sur cette période (cf le blog d' Hérouville-Espéranto, article de Yves Nicolas)

Référence pour le vocabulaire technique ou tout autre domaine, il guide des cours, participe à de nombreuses initiatives et participe très régulièrement à la vie de notre club.

Très régulièrement aussi il a alimenté le bulletin normand avec des articles ou des poèmes.

Lors de son inhumation au cimetière de Mathieu, parmi sa famille, ses amis, des habitants qui le connaissaient comme le Monsieur Espéranto.

Sa nièce a pris la parole en Espéranto bien qu' elle soit la seule espérantiste de la famille, lui rendant hommage et les membres présents de notre association l' ont remerciée et ont été touchés de l' accueil de tous. À son épouse, sa famille nos sincères condoléances.

Michèle Langeois B.N



C.A de l' E.A.M en 1962.
Henri Rousseau à droite et ci-dessous



Havro kaj Esperanto: longa historio

Ĝi komenciĝas en la lasta jarcento. En **1900**, Émile Gasse, la unua normanda esperantisto, gvidis la unuajn kursojn ekde marto. Tri jarojn poste, unua renkontiĝo okazis inter Esperanto-parolantoj el Dovro kaj Havro. En **1904** la amiko Gasse sendis Esperantan poŝtkarton al Federico Villereal.

Aliaj lokaj samideanoj aliĝis al la galerio de portretoj de normandaj esperantistoj. Ili transdonis al ni sian entuziasmon, sian sperton. Ili estis prezidantoj de kluboj, Esperanto-instruistoj. Ni memoru ankaŭ Marcel Bosc, Espérance Noël, Maurice Huet, Jean Gibaux, Alain Chalm, Jean Colombel.

Signifaj eventoj markis nian historion, kiuj kondukis ilin partopreni en nia asocio.

1936: Lidja Zamenhof restadis en la unua duono de 1936. La konferencoj de Sanvic kaj ĉe la Borso de Laboro kondukis al kreado de kursoj (300 lernantoj!!!). Se la peza etoso de la Dua Mondmilito ŝajnis detrui ĉian esperon, lumo ekflagris sur la Atlantika Muro. Havra rekviziito hazarde renkontis du eksterlandajn STO-anojn devigitajn de la okupanta armeo. Ili kaŝe komunikis ekster gardado. Interkonsente, ili konfidis sian sekreton «Esperanto» al Jean. Jen kial nia amiko ĉe la liberigo aliĝis al ni.

Nur en **1945** kursoj rekomenciĝis kaj la Havra asocio kunigis la antaŭmilitajn klubojn: neŭtrala grupo, laborista esperantista grupo... kiuj tiel bone laboris kun la subteno de la laboristaj sindikatoj por la alveno de Lidja Zamenhof.

La sekva entuziasma jardekon estis markita de regionaj konkresoj **1950 /1954/ 1958** kiam estis inaŭgurita Zamenhof-strato. En **1965**, okazis nacia kongreso.

1970-aj jaroj - 1980-aj jaroj: okazis ĝemeliĝo kun Esperanto-grupo de Southampton (1972), sekvata de aktiva amika alianco dum ĉirkaŭ dek jaroj.

La urba fresko de kvartalo Perrey tiam elvokis longan esperantistan ĉeeston.

1980-aj jaroj -1990-aj jaroj: Dank' al Jarlibro, okazaj vizitantoj vigligis niajn renkontiĝojn.

2000-aj jaroj: Havro estis ofta etapo de esperantlingvaj prelegantoj.

Dum la lastaj dudek jaroj, nia bona teamo koncentriĝis pri komunikado: starigo de retejoj esperantolehavre.org kaj turismo kaj Esperanto. Fidela delegacio partoprenas niajn normandajn renkontiĝojn.

Nia teamo incitis la Turisman Tagon kaj intervenas en evoluantaj fakoj: **Patrice:** interreta instruado, **Bernard:** ĝeneralaj informoj (ZEO...), **Sylvie:** Esperanto-parolanta turisma bonveno (retejo Greeters).

Sylvie Caron - Le Havre

Tradukas: **Dominik Cornice**



1936



Lidja ZAMENHOF

EDUKADO. 18 jarojn poste, la olimpika flamo transiras en aliajn manojn: tiuj studentoj renkontas iaman portanton

Grupo de studentoj de la kolegio Sévigné povis renkonti Zéphirin Jégard, portanton de la olimpika flamo dum la Vintraj Olimpikoj de Torino en 2006, kaj loĝanton de Saint-Georges-des-Groseillers. Rakonto.



Merkredon la 3-an de aprilo, en la kolegio Sévigné, la studentoj de la klaso 5-a B ¹ renkontis Zéphirin Jégard, portanton de la olimpika flamo dum la Torinaj Vintraj Olimpikoj en 2006, loĝanton de Saint-Georges-des-Groseillers ².

Tiu ĉi renkonto, kiu okazis dum la olimpika kaj paralimpika semajno, sekvis klaslaboron pri la olimpika flamo (deveno, simbolo, dezajno, itinero kaj torĉoportantoj).

Interŝanĝo per demandoj.

Antaŭ tiu ĉi renkonto, la studentoj verkis skribe unu aŭ plurajn demandojn por meti. Tiel, 16 demandoj estis listigitaj por tiu ĉi intervjuo.

Merkredon matene ankaŭ Zéphirin, akompanata de Laurence Rouf, lia bofilino, pacience atendis la alvenon de la studentoj.

¹ 5-a : Dua franca mezlerneja klaso por infanoj kiuj aĝas ĉirkaŭ 12 jarojn. La litero B indikas pri kiu klaso temas inter tiuj de la sama nivelo en la kolegio Sévigné.

² Vilaĝo apud la urbo Flers en Normandio (Francio).

Post prezentiĝo, Zéphirin klarigis kiel enkonduko al la diskutoj, la originon de la Olimpikoj kaj kion ili simbolas. Tiam venis tempo por la intervjuo. Dorian "Je kiu aĝo vi komencis sportadi?"; Aimy: "Kiajn sportojn vi praktikis?". Zéphirin respondas: Mi komencis kuri kiam mi estis 15-jaraĝa. Poste, mi haltis dum mi laboris. Mi rekomencis kiam mi emeritiĝis je la aĝo de 60 jaroj. Oni donis al mi biciklon tiam mi komencis bicikli. Unue sola, poste en klubo. Nuntempe mi piediradas kaj mi promenas ĉiutage."

Maëlle: "Kion vi faris por porti la olimpikan flamon? Ĉu vi povas rakonti al ni vian historion?" Tiam Zéphirin komencis klarigi kronologie sian sportan karieron, emfazante la progresecon de siaj defioj. Do, li rakontis sian unuan gravan biciklan vetkuron, Parizo-Brest-Parizo, en malpli ol 90 horoj, tiam sia biciklado ĉirkaŭ la mondo laŭ la 50-a paralelo, en tri someroj. "Sur mia biciklo, mi havis 40 kilogramojn da pakaĵo, kaj la butikumaĵon." Li raportis fine pri sia monda rekordo establita inter Brest kaj Vladivostoko per biciklo en 65 tagoj, 22 horoj kaj 38 minutoj, en la aĝo de 69 jaroj.

Aŭtentigita biciklada monda rekordo

"Ĉu vi iam spertis okazaĵon, kiu timigis vin?", demandas Lenny. Zéphirin respondas ke li estis timigita du fojojn. La unua dum li transiris Kanadon. "Mi renkontis urson rande de la vojo. Mi haltis kaj alparolis ĝin. Ĝi aŭskultis min. Mi fotis ĝin kaj poste reiris sur mian biciklon esperante, ke ĝi ne sekvos min. La duan fojon okazis en Ĉinio, laŭ la Flava Rivero. Dum bivako, je la dua matene, mi aŭdis du homvoĉojn. Ili ĵetas ŝtonojn al mi. Mi surmetis mian kaskon, mi eliris el la tendo kriegante. Tiam ili foriris."

Raphaël tiam demandas lin. "Kial vi estis elektita por porti la olimpikan flamon?" Zéphirin klarigas, ke lia nevo proponis lian kandidatecon kiel torĉoportanton pro tio, kion li plenumis. "Mi estis elektita pro ĉio, kion mi faris, precipe pro mia aŭtentigita mondrekordo per biciklo inter Brest kaj Vladivostok."

Mi portis ĝin finbrake kiel eble plej alte.

Tempo por demandoj pri la jaro, lia aĝo, la loko, kiam li portis la flamon. Zéphirin klarigas, ke estis en Grenoblo, en 2006, okaze de la Vintraj Olimpikoj de Torino, kiu okazis de la 6-a ĝis la 26-a de februaro. Li insistas, ke li havis 70 jarojn kaj duonon. Kelkajn monatojn pli frue, li suferis apopleksion kiu kaŭzis al li paralizon de la dekstra flanko.

Kun la torĉo, Zéphirin devis trairi proksimume 500 metrojn. "Kurante, la afero okazas tre rapide. Sed mi ne povis kuri plu, ĉar mi suferis apopleksion. Estis tre malfacile, ĉar la torĉo estas sufiĉe peza. Ĝi pezas 1,75 kilogramon. Kiam mi paŝis, la flamo venis al mi do mi portis ĝin finbrake kiel eble plej alte." La viro tiam parolis pri la transdono de la flamo "al granda olimpika ĉampiono": Edgar Grospiron, olimpika liberstila skiĉampiono en 1992 en Albertville.

Noah tiam demandis al li ĉu li fariĝis tre populara. Zéphirin indikis, ke li estis konata en la okcidenta parto de Francio kaj precipe en Bretonio, ĉar li devenis de Yffiniac.

Torĉo-stafetkurado en la ludejo

"Ĉu vi volis iam ĉesi sporti?, demandas Selyan. "Malvolonte mi devis." Mi ne plu havis sufiĉan ekvilibron por bicikli. Nun mi piediras ĉiutage, en ĉia vetero."

Fine, Summeyer demandas "Kio estas la plej bona afero, kiun vi faris kaj pri kiu vi plej fieras?" Senhezite, Zéphirin elektas sian mondvojaĝon per biciklo.

Post tiuj diskutoj okazis stafetkurado en la ludejo. Ĉiu lernanto spertis la privilegion porti la torĉon dum pluraj metroj, laŭvice, kaj tiel senti la pezon de la torĉo.

Zéphirin tiam akceptis kun granda plezuro memorigan fotosesion. Ĉi tiu renkonto substrekis, ke neniam estas tro malfrue havi regulan fizikan trejnadon kaj ke tio povas konduki travivi esceptajn momentojn: la vojaĝo de Zéphirin pruvas tion. Stafetkurado okazis, 18 jarojn poste: la torĉo transiris en aliajn manojn.

Artikolo tradukita de **Bertrand Verstraete**

ZEF : "Tra la mondo per biciklo kaj esperanto" "Avo biciklas cirkaŭ la mondo"



À l'occasion des 40 ans de notre association Hérouville Esperanto, nous avons organisé **une journée portes ouvertes** le 12 février 2024 à la Maison Des Associations (MDA) d'Hérouville Saint Clair. Nous avons préparé des affiches à apposer dans les locaux de la MDA, des flyers à distribuer et rédigé une annonce qui est parue à trois reprises dans le journal interne de la MDA. Nous avons aussi sélectionné trois vidéos de BD en Espéranto.

Mais les résultats n'ont pas été à la hauteur de nos espérances: seule une petite douzaine de personnes sont venues nous visiter. Manque d'intérêt pour la langue internationale, manque de temps etc... ?

« Ne gravas » Nous avons passé un très bon moment entre nous.

C Marlier-Riquier



Cora, Christian, Brigitte, Christian V, Christian D et Joëlle.

Ouest-France
Jeudi 14 mars 2024

14 mars 2024
Ouest-France

Hérouville-Saint-Clair

Accueil d'Hérouville espéranto à la bibliothèque

Un réseau de contacts dans le monde entier

De gauche à droite : Brigitte Cottin, membre d'Hérouville espéranto ; Annie-Rose Pichonnier, bibliothécaire ; Michèle Langeois et Gérard Sénécal, espérantistes, viennent d'accrocher l'exposition.

(Photo: OUEST-FRANCE)

Pourquoi ? Comment ?

Pourquoi une exposition sur l'espéranto est visible en ce moment à la bibliothèque ?

« La bibliothèque est un lieu familier pour l'association Hérouville espéranto. Une conférence de Renée Triolle se déroulera vendredi 22 mars, à 18 h », déclare Gérard Sénécal, ex-président de l'association.

Ce temps fort fait partie d'une série d'événements qui vont marquer le quarantième anniversaire d'Hérouville espéranto. « Depuis longtemps, le partenariat avec la bibliothèque existe, il se prolonge par l'Heure du conte, lecture bilingue espéranto-français. L'exposition didactique qui a pour but de sensibiliser le public à l'espéranto sera présente jusqu'au 27 mars », précise Annie-Rose Pichonnier, bibliothécaire.

Quel est le thème de cette conférence ?

Renée Triolle est directrice des examens de l'Institut français d'espéranto et professeure de russe. Elle a contribué à la traduction en français de la

thèse de l'historien allemand Ulrich Lins, *L'espéranto, langue dangereuse*.

L'espéranto est une langue facile, régulière, équitable. Mettre tous les gens sur un pied d'égalité pour communiquer librement n'était pas du goût des dictateurs Hitler et Staline. Renée Triolle fera le point sur l'actualité de l'espéranto et les persécutions subies par des espérantistes.

Quels autres événements sont prévus pour cet anniversaire ?

Un stage d'initiation pour débutants est organisé samedi 23 et dimanche 24 mars, à la Maison des associations. Parlé par deux millions de personnes dans 120 pays, l'espéranto est dix fois plus rapide à apprendre que l'anglais. Les inscriptions pour ce stage restent ouvertes. La participation aux frais est de 20 € et 5 € pour les étudiants. La collaboration de la Ville au 40^e anniversaire d'Hérouville espéranto se concrétisera aussi par la plantation d'un arbre sur le square de l'Espéranto, à l'automne prochain.

Contact. Tél. 07 86 28 99 85 ou 06 09 42 10 06.



Lecture bilingue à la bibliothèque avec Bertrand, Véro au saxo, Gérard et la bibliothécaire Anne-Rose.
Belle écoute des petits et des nounous.

Une conférence de Renée Triolle et deux stages d'Espéranto pour le 40ème anniversaire de l'Association Hérouville Espéranto

L'Espéranto, langue dangereuse ?

Le vendredi soir 22 mars la bibliothèque d'Hérouville accueillait la conférence de Renée Triolle. La directrice des examens de l'Institut français d'esperanto, professeure de russe est aussi ex-vice présidente de l'Association universelle d'esperanto qu'elle a représenté à l'Unesco (Organisation des nations unies pour l'éducation, la science et la culture). La conférence avait pour titre « L'espéranto, langue dangereuse ? » Renée Triolle, s'est appuyée sur la thèse de l'historien allemand Ulrich Lins, qu'elle a contribué à traduire en français, pour montrer les persécutions commises par les dictateurs Hitler et Staline envers des esperantistes. Une cinquantaine de personnes sont venus écouter la conférencière.



Stages d'initiation et de perfectionnement

Le samedi 23 et le dimanche 24 mars, Hérouville Espéranto organisait deux stages à la Maison des associations. Un stage d'initiation avec Renée Triolle a réuni huit personnes dont trois ont l'intention de poursuivre l'apprentissage de la langue. Une quinzaine de stagiaires ont suivi la session de perfectionnement animée par Françoise Noireau, professeure d'espéranto et violoniste. Les deux groupes ont partagé un repas festif le dimanche midi.

Ces événements font partie du programme des animations prévues en 2024 pour le 40 e anniversaire d'Hérouville Espéranto.

Bertrand Tarlevé




21 - 30 octobre : stage d'espéranto, examen FEI, chant chorale, programme pour enfants ... à Grésillon

Bonvolu jam noti tiujn datojn, detaloj venos poste. Ĉu vi venus por lerni, kanti, esperantumi ? Ĉu vi proponas instrui, prelegi, gvidi aktivaĵojn?

Greziljono atendas vin!

gresillon.org

La 8-an de Novembro Plantado de la ginkgo kaj koncerto.



Le ginkgo, plus vieil arbre du monde, celui qui a survécu à la bombe nucléaire à Hiroshima, est devenu le symbole de la Paix.

Pour clore l'année du 40ème anniversaire de notre association et avec l'aide de la mairie d'Hérouville-Saint-Clair **un ginkgo sera planté**

square Espéranto le 8 novembre à 17h (square derrière la **Maison Des Associations** d'Hérouville Saint Clair, inauguré il y a 10 ans pour les 30 ans de notre club).

Plantation animée en musique par les élèves clarinettistes du conservatoire et par Armel Amiot déjà bien connu des espérantistes. Après la plantation et la "cérémonie" officielle

un pot de l'amitié clôturera cette 1ère partie.

Vers 20h, Armel Amiot continuera la fête avec un concert au **Café des Arts** (02 31 94 21 48) avec un répertoire Espéranto tiré de ses 2 derniers CD et du chanteur **Graeme Allwright** !

Afin de nous permettre une bonne organisation, merci de nous informer de votre présence à 17h et au concert gratuit, nous ferons passer un chapeau. Un hébergement sera possible pour les espérantistes éloignés sur demande et en fonction des places disponibles.



<https://www.armelamiot.com/fr/esperemo.html>

A renvoyer à Christian Marlier-Riquier le trésorier à riquier2@gmail.com ou esperanto.herouville.14200@gmail.com ou par courrier à Christian Marlier-Riquier : 11 rue des Frères Colin 14000 CAEN (tel 0786289985)



NOM.....Prénom.....

adresse @@.....

Téléphone Portable.....

Je m'inscris pour la plantation le 8 novembre à 17h.

Nombre de personnes

J'assisterai au concert ☐ oui ☐ non